



# la informilo

\*\*\*

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto  
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série  
trimestriel

4<sup>e</sup> tr. 1979

N°28



abonnement

un an: 12F

UNU JARO: 12F

( 8 INTERN. KUPON. )

## ANTO .... FLASH \* ESPERANTO .... FLASH \* ESPERANTO

RADIO-PEKIN TRIPLE SES EMISSIONS EN ESPERANTO! \*

Inaugurées voici 14 ans les émissions en espéranto en provenance de Chine Populaire viennent en effet de passer de 3h hebdomadaires à ... 10h30! Depuis le 30 octobre les 3 séquences d'une demi-heure (dont une spécialement dédiée aux auditeurs européens,) diffusent un programme culturel sur la vie de tous les jours en Chine et sur les événements mondiaux liés à l'espéranto.

Longueurs d'onde: 43m et 31m. - Horaire pour l'Europe: 21h/21h30

\* L'ESPERANTO AU SERVICE DE LA MEDECINE.

*La seconde Conférence des médecins espérantistes s'est tenue à Hódmezvassarhely (Hongrie) en juillet dernier. 126 médecins de spécialités diverses, de 8 pays européens, y ont participé et échangé leurs expériences.*

*persisteme... optimisme... ĉar ni fidas  
la saĝecon de la normala homaro tutmonda  
(la plej potenca!), ni deziras al niaj legantoj...*

*Ĝeliĉan jaron 1980!*



---

 \*  
 UN NOUVEAU DISQUE EN ESPERANTO.

Edité par l'Association Espérantiste Islandaise, enregistré par le célèbre chœur mixte Hijomeyki, lequel s'est fait applaudir récemment au Congrès Mondial de Lucerne, ce 33 tours comprend un répertoire de chansons populaires, la plupart inédites. Ce disque est en fait une édition de valeur qui prend place auprès de l'enregistrement également récent du ténor bulgare DAMJANOV (qui donnera un récital à METZ en avril au Congrès Régional d'Espéranto) et du chanteur suisse Olivier TZAUT.... Un disque en espéranto?... Une idée de cadeau tout à fait originale!

---

 \* "MONATO", REVUE MENSUELLE INEDITE TOUT EN ESPERANTO.

*Le lancement de ce magazine constitue une innovation sans précédent dans la presse internationale. Avec ses propres correspondants dans 40 pays du monde, MONATO, qui paraîtra à partir de janvier 1980, se propose d'apporter à tous les pratiquants de la langue mondiale, une moisson d'informations touchant tous les thèmes d'actualité: politique, économie, culture, science, technique, mode, cuisine, sport, tourisme, humour, etc... Tous renseignements (abonnement en particulier) auprès des "Editions TK/STAFETO," Heideweg 20. B 2120 SCHOTEN (Belgique)*

---

 \*  
 LE 36<sup>e</sup> CONGRES INTERNATIONAL DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE

se tiendra à RAUMA (Finlande) du 25 juillet au 1<sup>er</sup> août 1980, précédant comme à l'accoutumée le CONGRES UNIVERSEL d'ESPERANTO de U.E.A. à STOCKHOLM. Le succès de ces Congrès de la Jeunesse s'affirme d'année en année, concrétisant ainsi de façon tangible le désir des nouvelles générations de vivre dans un monde sans frontières et sans haine, où l'espéranto apparaît comme un outil moderne d'émancipation fraternelle.

---

 \*  
 LA NORVEGE INVITE LES PARTICIPANTS DU 65<sup>e</sup> CONGRES UNIVERSEL DE STOCKHOLM.

*A l'issue de ces assises mondiales qui se tiendront durant la première semaine d'août dans la capitale suédoise et dont nous reparlerons à nos lecteurs, les espérantistes norvégiens organisent en effet un "post-kongreso" (après-congrès) de 3 jours qui permettra aux participants de visiter entre autre les anciens bateaux des Vikings, le FRAM, qui s'illustra dans les expéditions polaires, le KON-TIKI et le RA de Thor Heyerdal, la fameuse piste de saut à skis de Holwenkollen et son panorama grandiose. Soirée folklorique et banquet sont également au programme. Les personnes intéressées se feront connaître à l'adresse suivante: "Postkongreso en OSLO," Boks 942, OSLO 1 NORVEGE.*

---

 \*  
 NOUVEAU SUCCES DU FESTIVAL INTERNATIONAL DE MARIONNETTES

Il s'est déroulé du 4 au 7 octobre 1979 à ZAGREB avec la participation de troupes professionnelles de Roumanie, Pologne, Espagne, Yougoslavie et France (Montélimar). 31 spectacles ont été présentés dont 20 en espéranto! Parmi les auditeurs, 150 enfants d'Italie, de Norvège, de Yougoslavie, du Canada et de Hongrie, dont quelques-uns animèrent eux-mêmes les petites poupées (la troupe de Cesena par exemple qui présenta le "Joueur de flûte magicien")

---

APRES L'UNESCO, UNE AUTRE ORGANISATION INTERNATIONALE,  
L'UNICEF,

... prend conscience de la valeur de la langue mondiale mise spécialement au service de l'enfance. Le Comité danois met en effet en vente, aux côtés des éditions traditionnelles (cartes postales, agendas, etc.) un livre illustré par deux enfants de 14 ans, rédigé entièrement en espéranto et qui se veut un appel solennel à la justice économique pour les pays en voie de développement. Chaque pratiquant de la langue internationale se doit de posséder cet album original et aider à sa diffusion systématique. S'adresser aux services des différentes librairies espérantistes. - titre: "INFANOJ EN LA MONDO" de G.H. MATHIASMOEN.

---

\* LA "CAMPAGNE POUR LE DESARMEMENT NUCLEAIRE" (CAMPAIGN FOR NUCLEAR DISARMAMENT)

... fondée par le fameux philosophe Bertrand RUSSELL vient de décider lors de sa dernière conférence à Londres de favoriser tous les efforts tendant à instaurer l'enseignement de l'espéranto dans tous les établissements scolaires.

---

\* UN NOUVEAU PRESIDENT POUR L'ACADEMIE D'ESPERANTO

Succédant au Français Gaston WARINGHIEN, c'est un Ecossais, William AULD, très connu dans le monde espérantiste, qui présidera désormais aux travaux de l'Académie Mondiale. Poète, romancier, auteur dramatique, W. AULD enrichit en permanence la littérature en langue mondiale. Nous lui devons également de nombreuses traductions des meilleurs ouvrages écrits en langue anglaise.

---

\* DISPARITION D'UN DES PLUS ANCIENS ESPERANTISTES DE FRANCE  
SECRETAIRE DU GRAND ECRIVAIN TOLSTOÏ.

Victor LEBRUN, né en 1882, vécut en effet près de 10 années auprès de l'auteur de "Guerre et Paix" à Jasnaja Poljana. Nous lui devons un important ouvrage biographique qui vient de paraître sous le titre "Léo Tolstoï, l'homme, l'auteur et le réformiste", oeuvre rédigée bien sûr en espéranto. Rappelons qu'en son temps Tolstoï avait assimilé la grammaire de l'espéranto en quelques heures et s'était fait un ardent prosélyte de la langue mondiale

---

\* "TINTIN" ET L'ESPERANTO...

C'est une documentation exhaustive de 7 pages que le célèbre hebdomadaire pour les jeunes de "7 à 77 ans" vient d'apporter à ses lecteurs, article ayant également paru dans l'édition en langue hollandaise "Kuijje". Des centaines de demandes de renseignements sont parvenues aux sièges des différentes organisations espérantistes. Les "Tintinologues" peuvent d'ores et déjà s'adresser à l'éditeur des fameux albums. La parution des aventures de Milou et de son jeune maître Tintin en espéranto connaîtrait sans nul doute le même succès que celui rencontré actuellement par "Asteriks"...

# ELSTARA, ARTA VESPERO en la kadro de nia

## 39<sup>a</sup> federacia kongreso

sabaton, la 26an  
de aprilo,  
je la 21a



rekte el Bulgario la famekonata baritono  
**veselin damjanov**

flugos al METZ por regali nin per unika  
recitalo!

VESELIN DAMJANOV jam triumfis sur tutmondaj scenejoj interalie en REYKJAVIKO, VARNA, LUCERNO... ankaŭ en CLERMONT-FERRAND okaze de la Internacia konkurso de la esperanto-kanzono. Li cetere konigis sin grandskale per disvastiĝo de disko, kies stoko tre rapide elĉerpiĝas.

Tiu nekomuna evento okazos en la moderna koncertĉambro BRAUN. DAMJANOV estos akompanata de la pianisto M. MERCIER, ege aprezata de ĉiuj muzikŝatantoj.



NEPRE ENSKRIBIĜU AL NIA  
FEDERACIA KONGRESO



*la programo kaj la aliĝilo estas aparte enŝovitaj en ĉi-tiu numero!!*

### RENOVIGO DE LA KOMITATO DE LA ORIENTFRANCA FEDERACIO



La mandato de la jenaj personoj (elektitaj en BAR-le-DUC en 1977) nun finiĝas:  
(laŭ alfabeto ordo)

*S-r<sup>o</sup> BERGEROT, S-r<sup>o</sup> DENIS, S-in<sup>o</sup> HAUSER,  
S-r<sup>o</sup> LIENHARDT, S-r<sup>o</sup> VANOLA, S-r<sup>o</sup> VOLTZ.*

Ili estas reelekteblaj. Ili bonvolu informi la prezidanton, ĉu ili denove kandidatiĝos. Samtempe, novaj kandidatoj bonvolu anonci sin, prefere antaŭ la kongresa tago.

J.P. COLNOT 15 rue de Lavaux 54520 LAXOU

LA FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1979 POVOS APERI NUR EN LA VENONTA  
"INFORMILO"

## \* AGADRAPORTO 1979

La ĉi-jara raporto komenciĝu per dankvortoj al ĉiuj aktivuloj de la Orientfranca Federacio. Plia danko iru al tiuj, kiuj klopodis kiel eble plej precize informi nin pri sia jara agado. Sed agadraporto ne estus raporto, se ĝi ne komenciĝus per ciferoj.

Jen...

144 individuaj membroj de la Federacio  
 57 aktivaj membroj de UFE  
 39 individuaj membroj de UEA  
 6 individuaj membroj de TEJO  
 220 abonantoj de nia bulteno "LA INFORMILO"  
 70 partoprenintoj en la 38a Federacia Kongreso en COLMAR  
 70 partoprenintoj en la 8a staĝo en NANCY (dec. 1978)  
 ... 57 en la 9a staĝo (junio 1979) kaj 70 denove en  
 la 10a staĝo (decembro 1979)  
 55 aliĝintoj al la perkoresponda kurso.  
 ... Plie, dudeko da Federacianoj ĉeestis diversajn interna-  
 ciajn renkontiĝojn: Luksemburgo, Paderborn, Stuttgart, Grē-  
 sillon, Lucerno kaj eĉ Marilia (Brazilio)

Nia celo kompreneble estas la kreskigo de nia movado. Tial funkciis E<sup>o</sup>-kursoj ĉu lernejoj, ĉu publikaj en Nancy, Strasbourg, Selestat, Bar-le-Duc kaj Munster. Pluraj gelernantoj jam vizitis niajn renkontiĝojn, sukcese trapasis ekzamenojn, aliĝis al la Federacio, abonas la INFORMILO-n.

Ŝajnas al ni, ke povus ekzisti ankoraŭ pli da kursoj, se plimulto da samideanoj ku aĝus ilin malfermi. Pro tio ni ankaŭ klopodis trafi la instruistojn pri lingvoj (vidu la alvokon presitan en la INFORMILO 27). Tiu unua kampanjo iĝu ada aktivado tiudirekten.

Unu el niaj argumentoj estis la "baldaŭa" (?) enkonduko de la Internacia Lingvo en la programojn de niaj lernejoj. Du terenoj estis elektitaj por la jena batalo: la politika kaj la sindikata. Pro la "eŭropaj balotoj" leteroj estis senditaj de pluraj samideanoj al la kandidatoj sed la respondoj...!?!... Ni do nur citu la pozitivajn rezultojn de tiu agado ĉe politikistoj, ĉar sciu ke tamen ekzistas deputitoj, kiuj subtenas nin. La deputito de Mozelo ekzemple, Jean LAURAIN, klopodas prezenti nian leĝproponon al la parlamento. Plie la Ĝenerala Konsilantaro de Meurthe-et-Moselle adoptis favoran rezolucion. Aliflanke, du samideanoj kontaktis la sindikaton de la liceaj instruistoj (SNES), vekis ĝian interesigon, pluinformis ĝin kaj okazigis interparolon en PARIZO. Ĝi iĝu fruktodona!

Grava afero estis la informado al la publiko pere de afiŝoj, flugfolioj (1800 en NANCY), libretoj pri esperanto, surveturilaj reklamiloj kaj komunikoj aŭ artikoloj en la regionaj gazetoj aŭ elsendoj ĉe la radio aŭ la televido.

Dum la tuta jaro pli ol 100 artikoloj aŭ komunikoj estis sendataj al 12 gazetoj. Kelkaj tekstoj estis tute enpresataj, aliaj redaktoroj aperigis nur mallongigojn, sed ĉefe gravas, ke oni legu la vortojn ESPERANTO - INTERNACIA LINGVO kiel eble plej ofte.

Ĉu kontentigaj rezultoj? Por plezurigi nin, ni diru jes! Por instigi nin al ada agado ni diru ... ne! Kaj ni daŭrigu! Ĉu vi helpos nin???

Edmond LUDWIG

### P.-S. ALVOKO AL ĈIUJ NIAJ AKTIVULOJ

Post ricevo de la dissendendaj demandiloj pri la agado en grupoj, ni malfeliĉe nur povis konstati, ke la petitaj informoj ne sufiĉe informas nin pri tiu agado. La redaktado de la agadraporto do estis sufiĉe malfacila tasko.

Jen propono: bonvolu simple listigi ĉiujn viajn klopodojn por la disvastigo de esperanto kaj informi la sekretarion aŭ la prezidanton sufiĉe regule kaj nepre antaŭ la komenco de la lernojaroj (oktobro). Ankaŭ ĉiuj novaj ideoj estas bonvenaj! Dankon

E. D. L.

# KIU ESTAS KUN NI ?

La esperanto-movado, en la lastaj jardekoj, mem dividiĝis en plurajn asociojn, kiuj havas siajn proprajn labormetodojn, kaj sin turnas laŭdezire al tiu aŭ alia grupo da homoj por ilin varbi al la uzo de la internacia lingvo. Tiu plureco estas verŝajne riĉeco ĉe la skalo de la mondo, sed ĉu ĝi ankaŭ estas necesa ĉe la regiona skalo? Ĉu pretekste de liberemo, oni transportu tian dividon, tiel ke ĉie ajn ekzistas mondetoj kaj multdirektaj grupetoj?

En 1979-1980, esperantistoj kreas novajn grupojn, kiuj volas havi kompletan liberemon; la organizantoj diras, «ni volas adeptiĝi al nenio. Niaj anoj mem sin ligos poste laŭ siaj inklinoj». Tiam senriskan solvon ne povas akcepti rigoraj homoj. Ja, kiam kunlaboron oni atendas el tiaj anoj? Se ili apartenas al malsamaj asocioj kies statutoj estas statute nekompereblaj, restos nur la ebleco kunvivi amike. Se, male, ilin koncernas ideoj, metodoj, agado, propagando, instruado, varbado, ili trovos sian sintenon seninteresa: Esperanto surportas unu ideon ALPORTI DEMOKRATAN KOMUNIKILON SEN DISKRIMINACIO AL LA TUTA HOMARO, kaj por tio oni devas plani seriozajn kampaĵojn.

Estas vera trompaĵo kredigi al samgrupanoj, ke ili povos taŭge atingi bonajn rezultojn sen adaptita strukturo. Klamaniere, iu asocio povas programi ion konsiderindan se la interaj grupoj ne volas difini sian gvidlinion. Evidente, la surpreno de tre neŭtrala, nepreciza vesto venigos al ili pli multajn anojn... kaj ili sin plezurigos per laŭaspekte ampleksa grupo... sed kion povos fari utile, tiuj ne engaĝitaj plurdevenaj homoj? Profitante el la varbolaboro de la aliaj asocioj, oni kreas sian propran...! Tiu emo al senligiĝo estas nek pozitiva, nek konstrua. Ĝi preparas la ruinigon de nia movado. Pluraj jardekoj ne sukcesis detruigi la laboron de niaj prauloj, ĉar ĉe ĉiu generacio troviĝis kelkaj elstaraj homoj por pluteni la torĉon... Sed ni ne plu estas ĉe la erao de la apostoloj, de la miraklofarantoj... nur konscie organizita komuna strebado havas ŝancojn puŝi nin sukcesen.

Malsamideaĵoj anoj ĉiam trovos ion fareblan kun iom da bonvolo kaj honesteco, sen ĝeni siajn proprajn emojn; sed nedifinitan vojon eĉ oportunistaj homoj ne povos laŭiri. Esperanto, sola, ne povos entuziasmi ĵusbakitojn, tiuj-ĉi pretos siavice ekvarbi nur se ili ricevos vojplanon klare de-

talitan. Ne sufiĉas diri al ili «elektu mem vian preferatan asocion», ili miros: «kiaj estas tiuj animantoj, kiuj eĉ ne fidis sian propran vojon!!» Ĉu ni devas nur havi religie la fidelecon al la deksex reguloj, kaj al la ĉapelitaj literoj? Ĉu ni devas kontentiĝi kun niaj familiaj kunsidoj, kaj kongresaj poŝtkartoj??

Se nia asocio U.F.E. deziras sin turni al UNESKO, aŭ al la Ministerio pri Edukado, aŭ al la politikaj partioj kiuj apogas nian leĝproponon... kion ĝi reprezentos se ĝi ne povas fidi al amaso da grupoj en la tuta lando, se ĝi ne havas la apogon firman de ĉiuj membroj, kaj se ties lokaj unuoj devas ĉiam atendi la kunvenon de la membroj por diri sian konsenton aŭ nekonsenton...? Iom da kuraĝo, kolegoj! Kial ne fari viaj la proponojn de nia komitato? Kial ne vin ĵeti senlime en nian grandan batalon? Kial atendi por doni precizigojn pri la elektita plano al viaj surlokaj gesamideanoj, kaj peni kun ili al ties realigo?

Preferu ni havu malmultajn, sed firme decidemajn grupojn kiuj klopodos al sama celo, ol dekojn da kriplaj ĉeloj kiuj vivas trankvile sed neniel efike!

Jean-Louis **TEXIER**  
U.F.E. - Prezidanto

\* *substrekis la INFORMILO-redaktoro*

Ĝuste pro la fakto ke mi -en la sino de nia Federacio- vivas "maltrankvile" kaj tamen "ne tro efike", mi submetis al niaj legantoj, kiuj eventuale spertus la saman "ĝenon", tiun ĉi-supran apostrofon de la Prezidanto de UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO (UFE), J.-L. TEXIER, por ke ili serioze meditu ĝin.

Ĉi-jare mi festis (?) la malfermon de mia ... 50a E<sup>o</sup>-kurso... Tiu evento rajtigas min -almenaŭ tion mi supozas- konigi mian vidpunkton de E<sup>o</sup>-prozelitisto, kiu dediĉis tiom da tempo kiom da mono al disvastigado de la "demokrata komunikilo al la tuta homaro" kaj kiu konstatas, retrookulumante al la rezultoj, ke ili ne tute sumiĝas al la multfaceta, laciga kaj daŭra strebado.

Mi pensas, ke la argumentado de J.L. Texier certgrade klarigas miajn... mi diru "missukcesojn". Al precizaj demandoj de ĵurnalisto el "LE MONDE", kiu intervjuis min antaŭ unu monato, interalie pri amplekso de la fenomeno esperanto en Francio... mi nur konfuzeme kapablis respondi...

Mi parte samopinias kiel J.L. T.; ni atingas elirpunkton de nova agadvojo nepre ligata al nia moderna epoko... ni ne plu kapablas *individue* ludi la rolon de la iama *konstanta semanto* ŝatata de Zamenhof. La hodiaŭa vivo estas ja *tro temporaba* kaj elĉerpigas multe pli rapide nian dinamismon ol antaŭe.

Tutevidente ekzistas dua *kvietiga* solvo: mi -kaj vi!- ĝuu trankvile la esperanto-aran ĝojn starigotajn de aliuloj. Unuavide tio ne estas al mi nealloga... Mi pensas eĉ, ke mi meritis tion... Sed ĉu tia sinteno kongruas kun mia propra temperamento... jen demando, al kiu mi hezitas firme respondi.

P. DENIS

## GEEDZIĜO \*

La 26an de decembro 1979 edziniĝis Fraŭlino Maria KUBIK al Sinjoro Eugène FOURNIER en HIDLINGEN proksime de Altkirch.

Nia "nova" samideano Maria FOURNIER estas Polino, kiu pere de Esperanto venis al Francio, kie ŝi laboras jam de 9 jaroj.

Al ambaŭ geedzoj ni gratulas kaj deziras feliĉan kaj harmonian vivon!

ek de januaro 1980...

aperas...  
modernigita,  
multfaceta,  
nia nova...

FRANCA  
ESPER..  
ANT..  
ISTO



La nacia asocio (UFE) decidis en sia lasta kunsido alporti al la nacia revuo la necesan bezonatan puŝon por ĝia disvolviĝo.

En la jaro 1980, kun ĉies helpo, ni intencas aperigi duoblon da paĝoj, kompare kun la nuna jaro.

La ĝenerala enhavo (atingota iom post iom) prezentiĝos laŭ la ĉi-apuda skemo.

Pri la fako FRANCO POR LA FREMDLANDO (kultimoj, turismo, historio, reklamo pri iu urbo aŭ regiono), kiu estas principe destinata al nia nefranca legantaro, ni petas vian apartan partoprenon.

Ni volas, ke FRANCA ESPERANTISTO estu legata ekster Francio, ĉar ni fieras pri nia laboro. Pruvindas, ke turismaj oficejoj konsciis, iom post iom, ke ILI POVAS UZI ESPERANTON POR REKLAMI EKSTERLANDE. U.F.E. faros la neceson, por ke ĈIUJ E<sup>o</sup>-Asocioj en la mondo, aŭdu pri tio.

Ni deziras do, ke en ĉiu numero, estu pritraktita unu regiono aŭ unu urbo...

Kion ni bezonas: artikolon pri la urbo, pri la ĉefaj vidindaĵoj (eventuale selektitaj), pri la kutimoj plej originalaj, amuzan rakonteton, ktp. Evidente ni pretas prezenti unu aŭ du fotojn kaj mapeton...

Tre interese ankaŭ estus se la koncernataj turismagentejoj konsentus partopreni al tiu propagando per PAGITA REKLAMO. Se ili volus fari tion alimaniere, ili rapide elspezus ... 10 000 F. Je ni, ni promesas sendi 10 ekzemplerojn de la revuo al ĉiuj UEA-Asocioj, SE LA URBOJ PARTOPRENOS AL TIUJ KVAR PAGOJ PER 1000 AŬ 2000 F (ni retrodonos 25% al la perantoj esperantistaj, grupoj aŭ individuoj)... Pliaj paĝoj povos esti aparte presitaj...

Karaj geamikoj, mi persone ege esperas, ke vi helpos nin tiudirekten. NI NEPRE BEZONAS INTERESAN REVUON por niaj novaj lernantoj, ni devas prui al la multaj esperanto-varbantoj ke, ANKAŬ, la nacia revuo ESTAS NEMALHAVEBLA por la disvolviĝo de Esperanto. Mi dankas vin, plej amike kaj samcelane via

Jean-Louis TEXIER  
U.F.E.-Prezidanto



AL NIAJ KURSGVIDANTOJ

Dum nia lasta kongreso en COLMAR okazis diskutoj pri la abono al nia INFORMILO. Montriĝis, ke iuj novaj lernantoj, ĉefe junuloj, ne povas pagi la plenan abonon al la INFORMILO. Tial por konservi tiajn junulojn en nia Federacio, ni konsentas favoran abontarifon por ili. Tamen por eviti kontroladon de naskiĝ-datojn, ni opinias, ke la kursgvidantoj estas la plej taŭgaj personoj por prijuĝi, ĉu liaj novaj lernantoj estas pagi-povaj aŭ ne, kaj ĉu ili meritas profiti la duon-tarifan abonon. Sekve ni petas al la kursgvidantoj, mem sendi la pagon kaj la adresojn al nia kasisto, interkonsente kun li. La kosto de tia favora abontarifo estas duono de la normala abono al LA INFORMILO, ĝi ne aperos en la kotiztabelo.

## ĈU NI BEZONAS FEDERACION ....?

Ni deziras proponi al vi temojn por cerbumado. Se ni ĉiuj cerbumos, ni tiel pli bone preparos niajn diskutojn por nia kongreso en METZ...

Nun temas pri informado. En nia lasta bulteno S-r° LUDWIG proponis cerbumi kiel krei efikan, regulan, kontantan informadon al la publiko pri Esperanto. Certe nia kutima informado ne sufiĉas kaj ne sufiĉe efikas. Kiel, kion fari? Sed ekzistas alia informado: informado inter ni, de via estraro al vi kaj de vi al la estraro kaj ankaŭ el kaj al U.F.E. Ni povas informi vin pere de nia INFORMILO. Sed por informi ĉiujn pri la laboro de ĉiuj aktivuloj, ni bezonas, ke vi sendu al ni komunikojn pri via agado. Ofte nian rubrikon "NIA VIVO EN..." ni plenigas per frazoj ĉerpitaj el diversaj leteroj. Tio ne estas tre facila laboro kaj ofte la informoj tiel liveritaj tre malfruas, kiam ili aperas kaj ne spegulas la ĝustan situacion (ekzemple eble en ĉi-tiu n° la informoj pri Metz).

Por ke nia informado al vi estu kiel eble plej kompleta kaj ĝisdata, estus necese, ke ĉiuj aktivuloj sendu komunikon (koncizan!) pri sia agado de la lastaj 3 monatoj, por la 1a de decembro, la 1a de marto, la 1a de junio kaj la 1a de septembro ĉiujare.

Ni jam petis vin tion fari kaj denove insistas pri tio.

Alia informado estas direkta al UFE. Nia tutlanda asocio sendas al ni ĉiun aŭtunon demandon (-aron!). Estas necese, ke la grupoj kaj izolitaj aktivuloj respondu kiel eble plej precize kaj resendu la demandarojn al la Federacia Sekretario. Siavice la Sekretario respondos al UFE pri la agado en la tuta Federacio (kaj poste UFE raportos al UEA pri la agado en Francio).

Kutime la "demandaroj" al la grupoj estis sufiĉe "ampleksaj", kio malkuraĝigis la aktivulojn respondi.... UFE plisimpligis ilin ĉi-jare... tamen la aktivuloj ne respondis pli volonte! La "demandaroj" al la Federacio male pli ampleksiĝis... kaj la Federacio devas respondi al UFE pri aferoj, kiujn ĝi ne konas, ĉar la grupoj ne ricevis demandojn pri tio kaj sekve ne donis la informojn!

Iuj "grumblis", ke la enketoj de UFE estas maldiskretaj... Sr° LUDWIG intencas proponi al UFE pli bonan metodon por enketi al la grupoj kaj federacioj.

Sajnas al mi utile restarigi la problemojn ek de la bazo: Ĉu UEA (Universala Esperanto-Asocio) estas utila?... Ĉu konsekvence ni aliĝu al ĝi?... Ĉu UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) estas utila?... Ĉu informado al ĝi estas utila?... Fine... ĈU NIA FEDERACIO ESTAS UTILA? ... Ĉu ĉiuj devas ĝin informi?...

Ĉu utilas diri, ke ĝenerala, negativa respondo al la antaŭlasta demando liberigus min el prezidanteco, kiu estas multe pli temporaba ol respondo al demandaroj de UFE...

J.P. COLNOT

## nia vivo en ...

...Kelkaj novaĵoj el Elzaco:

### SELESTAT

Al la du klasoj en la liceo aldoniĝas grupo da 40 gelernantoj el la kolegio, ĉiuj gvidataj de Sr° GUEGUENIAT.

### COLMAR.

En la kadro de ALEP (Association des Loisirs et de l'Education Permanente) en COLMAR funkcias ĉiulunde paga E°-kurso vizitata de 8 gelernantoj. Tiel Esperanto troviĝas sur la sama nivelo kiel la aliaj vivantaj lingvoj instruataj. Estas notinde, ke ĉeestas 3 profesoroj el la kolegio de Rouffach, kiuj jam nun reklamas pri nia lingvo ĉe la gepatroj kaj gelernantoj.

### METZ

Sr° De Zilah faris 11 prelegojn en 11 klasojn de liceo FABERT. Trideko da gelernantoj komencis lerni la lingvon dum du horoj ĉiusemajne. Sin° De Zilah animas grupon de progresantoj.

En la Junuldomo St-Marcel 14-16 personoj kunvenas ĉiuvendrede. Tri komencantoj aliĝis al la nova kurso, ankaŭ gvidata de Sr° De Zilah.



En Junuldomo Philippe Desforges. 2 parolaj kursoj okazas marde je la 20a30 (7 gelernantoj gvidataj de S-r° Scheffler) ĵaŭde je la 18a (1 lernanto gvidata de F-in° Marchal)

Kursoj 2a-gradaj okazas dufoje monate kaj kurso 3a-gradaj unufoje monate, ĵaŭde je la 20a30. Komence ĉeestis 4 aŭ 5 personoj sed dum decembro nur 2... Ĉu ni daŭrigu?

En liceo Georges de la Tour, nova kurso funkcias per la "Nova Racia Kurso" por 5 lernantinoj. Ek de la 1a leciono, la 13an de novembro, mi klarigis al la lernantinoj, ke 50/60 horoj estas necesaj por lerni Esperanton. Mi do postulis, ke ili trovu tiun tempon antaŭ la fino de aprilo por povi finlerni la kurson... kiu nun entuziasme funkcias dum 45 min. Ĉiusemajne, marde je la 13a horo. La ceteran tempon la lernantinoj dediĉas al esperanto ekster la kurso mem.

J.P.C.

### LA HINGRIE

La 19an kaj 20an de majo okazis en La Hingrie la ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj sub la gvidado de S-r° ZIPFEL kiel kutime.

Partoprenis kelkaj personoj, la belega vetero estis ankaŭ kun ni kaj la bona humoro! La brilanta suno altiris ĉiujn eksteren, kie oni povis manĝi kaj resti tutan dimanĉon posttagmeze, babilante agrable en esperanto kaj promeni en la montaro admirante la belan naturon.

Je la fino Sr° Zipfel ludis por ni belege je la violono; oni estus ŝatintaj aŭskulti la belan muzikon dum longaj horoj sur la verda fono de la naturo. Do ĝis la venonta jaro, karaj gesamideanoj!

Maria KUBIK



### korespondpetoj

Kun ge-Francoj deziras korespondi 39-jara eksedzo NAGY JANOS  
H-4002 DEBRECEN 166 Hungario

Deziras korespondi kun ge-Francoj 25-jara presisto. Ankaŭ interesiĝus pri kunlaboro kun franca klubo: Josef SLIACKY - TLACIARNESNP  
CS-96150 ZVOLEN Ĉeĥoslovakio

Deziras interŝanĝi nestampitajn poŝtmarkojn, bildkartojn (reproduktaĵoj de famaj artistoj), poŝtstampojn, pm. pri la temoj: pentraĵoj, katoj, hundoj, futbalo, kosmo: ANTONOV G.P. Autotransportnikov 1-79  
USSR-34014 DONEZK Sovetio

Deziras leterajn rilatojn (kun Francio) 45-jara teknikisto de metalurgia uzino, edzo (2 infanoj). La edzino deziras interŝanĝi bildkartojn, stampitajn p.m. ktp. Skribu al : Antonin BOMBIONKA - SOKOLOVSKA 1178  
CS-70800 OSTRAVA 4 Ĉeĥoslovakio

Hispana samideano, granda amato de motorcikloj (posedas KAWASAKI 1000 kc) dezirus amikan korespondadon kun esperantista motorciklisto.  
Skribu al S-r° Alejandro Cervera Meseguer  
c/Ramon y Cajal 4 ALDAYA (Valencia) Hispanio

### Ĉu vi ŝakludas?

Ni memorigas al vi la ekziston de Esperantista Asocio, kiu ebligas ludi ŝakturniron perkoresponde. Ĝia nomo estas E.Ŝ.L.I. ...ESPERANTA ŜAK-LIGO INTERNACIA...

Ĝi grupigas ĉirkaŭ 500 samideanojn kaj ĝia kotizo estas malalta: 10F jare.

En la perkorespondaj turniroj oni ludas kontraŭ 3, 5 aŭ 7 alilandanoj (ĉefe Orient-Eŭropanoj). Eĉ la freŝbakitaj esperantistoj povas ludi tiamaniere, ĉar fakte ne bezonas longajn frazojn por konigi sian movon al kontraŭulo. Sed kompreneble oni ankaŭ povas uzi tiun interŝanĝon de poŝtkarto por pli longe korespondi pri ŝatataj temoj... kaj kolekti poŝtmarkojn.

Foje E S L I aranĝas ŝak-festivalon. La venonta okazos en Hungario (26/7 - 5/8 1980)

Se la ŝak-ludo interesas vin, turnu vin al la franca delegito:

Sr° Fernand LEGREE, 2, allée des lilas, 93140 BONDY

10-a de aŭgusto, 1978,

La suno flave leviĝas tra nebuloj. Malgranda hindia sciuro lavadas sian nigran muzeleton en la veranda angulo sub la ŝajne malscivolema blueska rigardo de trio da monedoj (hindaj birdoj): volonte ili ekmanĝus ĝin, sed la malgranda sciuro estas vivanta, kaj la monedoj malkuraĝas. Respekto de la vivo: "ahimsa". Tra la trianglo de du tegmentoj kaj la supraĵo de nia pordo la ruĝa kupolo de la katedralo Sankta-Tomaso limigas mian vidon... Kozikhode en Keralo. Antikva kristana lando de Hindio. Hieraŭ mi ĉie-dise vidis la Kristanojn, ĉi-tie plimultajn, portantajn la foton de la ekmortinta Papo, Paŭlo VI. Alie, ni eĉ ne eksciintus la morton de la Sankta Patro. Ofte la turistoj kredas ke la Kristanoj ĉi-tie estas restaĵoj de la angla kolonia imperio, do forturniĝas de ili. Kompreneble, por la ĉartprezo, ili volas aŭtentikajn enloĝantojn, laŭregule malriĉajn, malklerajn, kompatindajn. Mirinde kiagrade la turistoj ŝatas kompati! Sed, ĉu oni kompat purajn, sanajn Malabarojn, elvenantajn el modernaj katolikaj preĝejoj, kaj kies gefiloj are disfluadas tra la stratoj kun pakedo da libroj subaksele? Nepre ne. Tamen ili estas kiel eble la plej aŭtentikaj enloĝantoj de ĉi tiu lando de la Suda Hindio, kaj ili ekricevis Kristanismon dum la unua (!) jarcento el la buŝo de Sankta-Tomaso mem, la apostolo. Almenaŭ la tradicio estas ĉi-tiel. Kleruloj kelkafoje diris ke oni konfuzas Sanktan-Tomason, apostolon, kun Sankta-Tomaso, kristana misiisto el la sesa jarcento. Ĉiu-okaze la Malabaroj ek-kristaniĝis multe da jarcentoj antaŭ ol la unua koloniŝta militŝipo portugala ekankriĝis en la haveno de Kalikuto (nun Kozikhode).

Ni ne bedaŭras nian alvenon ĉi-tien. Unua-vice ni veturis ĉi-tien por rekonti la U.E.A. delegiton: Fr. Henry JOSEPH. Li estas delegito de Kalikuto, sed ankaŭ fakdelegito pri medicino. Laŭ la nomo ni kredis ke temas pri anglahindia pastro, ĉar multe da ili restis en Hindio post la Sendependeco, kaj petis la hindian ŝtatanecon. Antaŭ tri jaroj ni renkontis en Raĝastano la pastrojn katolikajn R. P. LESSER kaj Fr. IGNACE: la unua ekse Anglo, la dua ekse Franco, estis. Ĉi-tiu renkonto incitis min kredi ke ankaŭ Fr. Henry JOSEPH estas francdevena pastro. Iom poste ni vidis nian eraron, sed, post nia alveno, ni nur ĝuis la bonajn manĝaĵojn de "Beach Hotel", kies ĉambroj estas ornamitaj per fotojn de ... la Turo Eiffel, la ĝardenoj de Versailles kaj la francaj Alpoj...!

Alveninte la direktoro de la hotelo salutis nin angle, kaj diris al ni, ĉiam angle, ke li tre ĝojas akcepti nin, ĉar ni estas samŝtatanoj kun li, t. e. li ankaŭ estas Franco. Mirado.

- Jes, jes. Vi tuj komprenas. Mia patro havis la francan ŝtatanecon, li eĉ estis doganisto, li eĉ batalis por Francio dum la unua mondmilito: la Marne... Verdun... Ŝemin des Dames... (li prononcas ĉi vortojn laŭ la angla prononcmalicio).
- Gratulojn! Sed vi povas alparoli nin france. Kial, inter Francoj, ni babilus angle?

Li ne komprenas, senutile sed ĝentilece ni ripetas, angle.

- Ah ne, ne. Bedaŭrinde mi ne scias la belan francan lingvon. Mia patrino nur parolis "tamul"-e, mi mem nur estis knabo kiam mia patro formortis (Dio vartu sian animon), kaj poste mi ne plu loĝis en la franca Pondiŝeri, do mi forĝesis la francajn vortojn.
- Do, kompreneble, viaj gepatroj estis francaj, kaj vi ekhavis la hindian ŝtatanecon en 1947.
- Ne, tute ne. Vi ne komprenas. Mi ne estas Hindiano, Franco kiel vi mi estas. Gepatroj miaj estis Francoj, sekve mi rajtas pri la franca ŝtataneco.

- Ni malkontestu, sed kian profiton vi esperas dank'al via franca Stataneco ?
- Mi jam ricevis leterojn de la franca Ambasadejo. Ĉu vi volas helpi min por legi ilin ? Oni redonos al mi la francan pasporton kaj mi rajtos iri Francion kaj tie eklabori.
- Sed - (mi balbutas, mi ne komprenas ĉi-tiun homon) - sed, ĉi-tie vi estas direktoro de bela hotelo, vi havas servistojn, vi estas ŝatata de ĉiuj ĉirkaŭ vi, kial vi volas forlasi Hindion ?
- Mi iros Francion, mi faros iajn ajn laboron. Eĉ manĝilar-purigisto gajnas en Francio pli da mono ol ĉi-tie direktoro. Kaj - li proksimigas intime sian ridetantan brunan vizaĝon - en Francio rasismo ne ekzistas, ĉiuj Francoj egalrajtaj estas : Libereco, Egaleco, Frateco. Ĉu ne ?
- Jes, jes... sed...

Kiel klarigi al ĉi-tiu homo ke li eraras, ke li pretervidas la veran riĉecojn, ke ĉe ni li nur estos fremda laboristo eĉ se li havos francan pasporton en la poŝo. Li vivas ĉi-tie, en Keralo, en la vera tropika paradizo. Li havas vestojn, nutraĵojn, dignon, respektindecon, bonan postenon en la socio, geamikojn, k.t.p...., kaj ĉi-tiu homo volas sklaviĝi ĉe ni ! Kia estas la homa koro ? La ĉinan saĝulon Lao-Tseŭ li ŝajne neniam legis : " Scii ke "sufiĉe" estas "sufiĉe", estas ĉiam havi sufiĉe " (iom dense, ĉu ne ?). Nur homo kiu scipovas taksi siajn bezonojn povas agi tiel ke li ne plu bezonu ion ajn. Ĉi-tiu Keralano havas ĉiujn dezirindaĵojn, sed ĉiutage li vidas Oŭestanojn, kiuj en unu monato elspezas, dum siaj ferioj, la dum multaj jaroj ŝparitan monon. Li vidas kiamaniere eĉ niaj malriĉuloj aspektas riĉe en Hindio. El kio elvenas nia laŭŝajna riĉeco, li ne scias, li nur ekhavis la malsanon : posedi ĉiam plie, li nur revas aliloke la Feliĉon. Kompreneble mi angligos liajn francajn dokumentojn por ke ĉi-tiu Franco komprenu ilin, sed mi esperas ke la franca ambasadoro trovos la rimedojn por malakcepti ĉi-tiun strangan peton de franca pasporto kaj li, laŭŝajne malafabla, kapablos malhelpi ĉi-tiun viron ekmalfeliĉigi sin mem.

Fininte ĉi-tiun aferon, mi demandas ĉu li konas "Devagiri College" -on. Jes, li konas ĝin, sed ĝi estas ekster la urbo. Ne, li ne konas Frater HENRY JOSEPH. Morgaŭ li vokos taksion por ni, ĉar en nia propra veturilo ni ne kapablos trovi ĝin :

- Ĉu estas tiel malfacile trovi ĝin ?
- Ne, tute ne. Fakte tre facile estas ... Sed vi ne kapablos trovi ĝin.
- Do, konsentite. Voku taksion.
- Post unu horo ĉu mi rajtas veni vian ĉambron kun la paperoj ?
- Jes. Ĝis baldaŭ.

.....

La taksio ekalvenis. La stiristo elsaltas la veturilon kaj febre gestadas. Se li povus nin enporti en la aŭton, interbrake kiel bebojn, li certe farus ĝin. Sed mi konas la kutimojn.

- Kiom kostas ĝis "Devagiri College" ?


Laŭŝajne li nenion komprenas. Se li diras la prezon, kiun li esperas pagigi de la turistoj, ĉiuj ĉi-tie, direktoro aŭ balaistoj, indigne ekkrius. Pli bone estus por li finfari unue la servon, kaj poste postuli la pagon, hel-pate de aliaj Keralanoj, kiuj ne atendas trinkmonon de la turistoj, la stiristo li mem indigne ekkrius ke ni promesis pagi kaj nun rabaton volas. Jen Hindio : ĉiam oni devas agi publike, diskuti ĉiujn prezojn, manĝi, dormi, kaj eĉ feki. Kaj ĉiuspeca "IZOLO" ege kostas. Por iuj ĉi-tio estas la feliĉo.

Ni estas tro "malsaltitaj", en Eŭropo, de la socia kurento, sed ĉi-tie, troe. Mi estas iom teda kaj fripone trafas :

- Nu, iru for ! Mi tuj uzos la propran veturilon.

(Vere, oni ne povas bone marĉandadi kun Eŭropanoj : aŭ ili pagas ion ajn per iom ajn, aŭ ili perforte altrudas la prezon gustan - ĉirkaŭ la trioblo de la prezo pagata de Hindianoj.) La taksiisto malluĝigas la voĉon kaj prezon diras, ni jesas antaŭ ol la marĉandado ne komenciĝas, eniĝas la veturilon. Mia Dio, pardonu... kiel maŝino ĉistate povas ekfunkcii ? Certe helpe de la Sankta-Spirito, ĉar ni jam enranĉadas la homamason. La hupo ne malsaltigas eĉ sekundon. Oni haltas, la stiristo demandas pri la vojo, nove ekhaltas, novaj demandoj. Ĉi-tie mi nenion komprenas : la lingvo de Keralo estas la "malajalam"-a, dravida lingvo, belsona, sed tute ne komprenebla. Ni forlasas la urbon. Mi feliĉe pensas pri la fiksita prezo. Alie mi jam estus opiniante ke la stiristo nin veturigadas laŭ la plej longaj vojoj por altigi la gajnontan monsumon. Finfine ni alvenas lernejsimilan konstruaĵaron. Kia paco ! Anstataŭ la ĵusa homamaso, nun neniu. Eĉ la aero ŝajnas maldensigita. Ni vokadas. Fine iu gardisto alvenas :

- Kion vi volas ?
- Paroli kun Frato HENRY JOSEPH.
- Kial vi volas kun li paroli ?
- Por, al li, diri ion.
- Kion vi volas diri al li ?
- Demandi pri la sanstato de la Keralanaĵ esperantistoj.
- Li ne povos respondi, ĉar li estas tre maljuna kaj malbone komprenas angle.
- Li bone komprenas la internacian lingvon, Esperanton.
- Ĉu vere ? Li jam estas tre maljuna, vi ne devas lacigi lin tro longe, se mi vokigas lin.
- Trankviliĝu, ni nur salutos lin kaj foriros poste.
- Bone, envenu ĉi-tiun ĉambro.
- Bonvolu eksidi.



La ĉambro, iu akceptoĉambrego, estas granda kaj tre pura, kun anglatempaj seĝoj. Ni atendas. Kiel dirite, ni atendas francan kuraciston. Li nomiĝas Henry Joseph kaj estas delegito UEA kaj fakdelegito pri medicino. Surprize do, ni vidas enveni altan, tre maljunan barbulon, kun tre strange verdaj okuloj en bronzkolora vizaĝo. Li videble tre ĝojas, la okuloj iom larve brilas, li ne kapablas eligi vortojn tra la gorgo pro emocio. De pli ol kvindek jaroj, kiam li eklernis Esperanton, neniam Esperantisto vizitis lin. Sekve li tre malfacile parolas la lingvon, kiun li scipovas bone legi. Ni parolas al li tre malrapide. Per gestoj kaj skribo

ni povas interkomuniki. Li nepre volas ke ni trinku teon kaj manĝu ion. Ni faras fotojn kune. Li emfazas la neceson saluti ĉiujn "gefratojn" esperantistojn de nia grupo. Li petas ke mi skribu detale al li pri mia vojaĝo tuj post nia realveno en Francujon, antaŭ ol "li mortos".

Kiam ni, hejme, ekzamenis nian dumsomeran leteraron, jam enestis letero de li. La tre maljuna homo skribadas mallongajn, sed tre pitoreskajn leterojn, el kiuj jen la lasta :

" Kara Samideano D-ro Eugeno,

Mi dankas vin por via letero kaj la enmetita foto. Senkulpigite min pri la malfrua respondo, ĉar mi estis iom malsana pro maljuna aĝo : 88 jaroj. Miaj kunuloj, ankaŭ pastroj, jam ĉiuj estas mortintaj. En Devagiri la vetero estas tre varma, tial mi foriris en la montaron, oriente, 45 mejlojn, kie kuŝas monaĥejo kaj hospitalo. La vetero estas iom pli malvarmeta ĉi-tie.


Tie okazis operacio al junulino. Kiam la doktoro malfermis sian uteron, aperis infano kun du kapoj kaj vizaĝoj, tri manoj kaj tri piedoj, du koroj kaj unu vosto. Kiam la infanofiguro estis eligita el la patrina utero, ĝi tuj mortis. La korpo estas metita en plado, sub akvo. Multnombraj homoj vizite venadas al la korpo. Mi ankaŭ vizitis ĝin.

Saluton kaj bondezirojn al via afabla edzino kaj al la du aliaj kiuj vizitis min.

Sincere via Hindia amiko : Fr. Henry Joseph C.M.I. "

(daŭrigota)

E. de ZILAH



Nu!... Ĉu vi havigis al vi novan notlibreton por 1980?... Gratulon! Bonvolu do malfermi ĝin kaj enŝovi enen tiujn datojn:

23a kaj 24a  
de februaro

Studa semajnfino por komencantoj kaj progresantoj gvidata de  
C. GACOND, P. Martinelli kaj G. Silfer.

informas: K C E pf 771 2301 LA CHAUX-DE-FONDS Svisio

\*

Paska sesio de Internacia Feria Altlernejo. Intensivaj kursoj  
por komencantoj kaj progresantoj dezirantaj trapasi ekzamenojn.

informas: I F A (sama adreso)

\*

30a de marto  
ĝis la 6a de aprilo

26a de  
aprilo  
ni ĉiuj  
vizitos ĝin!!  
27a de  
aprilo

KONGRESO de la ORIENTA FEDERACIO de UNUIĜO FRANCA por ESPERANTO.  
(vidu aliĝilon en ĉi-tiu n°)

informas: S-r° De Zilah, 39 rue Joseph Henot F-57070 METZ

\*

Kultursemajnfino de SARLANDA ESPERANTO-LIGO. Tiu nova rendevuo  
iĝos kiel kutime enhavriĉa. Se vi ne jam partoprenis... nepre  
aliĝu!

informas: S E L - Schulstr. 30 - D-6601 SCHEIDT Germanio

\*

1a-4a de  
majo

SES-tagoj en BASEL (Svisio) La grupo fariĝos tiam... 75-jara!  
Programo eksterordinare ampleksa!  
Niaj legantoj en Alzaco estas aparte invitataj... pro la mal-  
longa distanco!

informas: S E S - Schorenstr. 32 - 4900 LANGENTHAL Svisio

\*

En La Chaux-de-Fonds, Esperanto-Festo kaj malfermo de la 3a  
somera sesio de INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO.

informas: I F A (adreson ni jam citis)

31a de majo  
1a de junio

\*

nepre  
ĉeestinda!  
14a kaj  
15a de junio

11a STAĜO de ESPERANTO PAROLATA. Ĝi okazos en "Ried et Hardt"  
F-68230 SOULTZBACH, inter COLMAR kaj MUNSTER. Ĝi renkontos sen-  
dube la saman sukceson kiel la antaŭaj!

(detalojn kaj aliĝilon vi malkovros en la venonta INFORMILO 29)

informas: Edmond LUDWIG, 46 route de la Schlucht, Stosswihr,  
F-68140 MUNSTER

**MONATO**  
internacia magazino sendependa



40 paĝoj DIN A4 - riĉe ilustrita  
11 kajeroj jare - jara abono:  
49,50 gmk aŭ 800,- b.fr.

Ekde januaro 1980 aperas ĉi tiu revuo kun multaj interesaj artikoloj el ĉiuj kampoj de moderna  
vivo: politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, modo, kuirarto, sporto, turismo kaj multaj  
aliaj. Kun apartaj paĝoj por infanoj kaj junularo, kun distraĵoj, noveloj, satiroj, enigmoj kaj  
konkursoj.

Propraj kunlaborantoj en pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj.

MONATO estas la revuo por esperantistoj de ĉiu aĝo, ĉiu medio, ĉiu lando. Tuj abonu!

Francoj povas pagi rekte al la konto de la eldonisto en Parizo: Torben KEHLET. Crédit Lyonnais. Compte 755.469 T,  
19, bv.des Italiens. B.P. 12-02, F 75060 Paris CEDEX 02. Ili nepre ne sendu al ni personajn ĉekojn. Tio estus kontraŭ la  
reguloj de la franca nacia banko. **abontarifo 112 F**

## FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... **abonnez-vous !**

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.

(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F)

+ ESPERANTO	revue offic. de UEA	abonnement simple	mensuel	72F
+ KONTAKTO	revue pour adolescents et jeunes gens		4 n°s	48F
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens		6 n°s	12F
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle		6 n°s	40F
+ HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'inform. format journal		18 n°s	64F
+ HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisat. scientifique.		4 n°s	10F
+ LITERATURA FOIRO	revue littéraire		4 n°s	38F
+ SCIENCA REVUO				45F
+ JUNA AMIKO	style simple - parfait pour débutants		3 n°s	18F
MONDA KARUSELO	nouveau magazine en E°		4 n°s	10F
HORIZONTO	revue du "mouvement neutre" E°			40F
LA MIGRANTO	bulletin des "amis de la nature"			20F
+ SCIENCA MONDO				20F
+ INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO				23F
+ EUROPA DOKUMENTARO				35F

Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.

Celles qui suivent sont généralement qualifiées "d'engagées"

+ BIBLIA REVUO				36F
+ OOMOTO	revue japonaise (philos. relig.)		6 n°s	35F
ESPERO KATOLIKA				30F
FRANCA KATOLIKA				12F
+ DIA REGNO	internationale (protestante)			38F
SAT-AMIKARO	bulletin mens. des trav. et syndic. franç.			52,50 F
SENNACIULO	même tendance mais international			75F
+ EL POPOLA ĈINIO	de Chine Populaire - en couleurs		1 an	14F
			2 ans	21F
			3 ans	28F
+ LA KANCERKLINIKO	d'avant-garde, politique et culturel		4 n°s	24F

→ Il est en outre également possible de commander à notre trésorier des petites affichettes de propagande, format 20 X 5,5 cm - 5 textes différents sur papier de 6 couleurs différentes:

10 → 2,80 F franco, 40 → 5,50 80 → 10F



\* Vous pouvez également vous procurer des vignettes gommées (4X3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents.

2 feuillets (18 vignettes) 1,80 F franco  
15 feuillets (135 vignettes) 10,50 F

\* Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi.

Les 8 cartes : 2,50 F → les 20 cartes : 5 F

Figure aussi sur notre catalogue le lexique bien connu de F. LEGER (Espéranto-Français)

1 ex. — 6F + 2F = 8F      2 ex. — 10F + 3,80F      5 ex. — 20F + 5,50F  
10 ex. — 30F + 7,90F      20 ex. — 50F + 11,50F

Ces prix pourront être éventuellement réajustés au moment de la livraison.

## SOLVOJ DE LA LASTAJ LUD-ENIGMOJ

"LA INFORMILO" n° 26 (krucvorttenigmo): pentekosto - epitomo - tie - rinocero - ar - steveno - mo - evonimo - aĵ - etoso - apude - koperniko - teujo - tramo - imuna - Jezuo - vipo - talono

"LA INFORMILO" n° 27 (krucvorttenigmo): arbarego - al - reunio - alno - gagat - peon - klera - iom - oratoro - hanibalo - azio - kronoj - eol - moab - ki - rio - ordeno - onklo - ili - bo

(silab-enigmo): "por glate mensogi oni spriton bezonas!"

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	L	A								
2	E	F	E	L	A	I	E	K	A	
3	A	N	A	T	E	M	O	N	A	
4	U	R	K							
5	I	O								
6	E									
7	N									
8	T	N								
9	K	E	N	T	O	A	N	I	N	
10	O	N	O							

## KRUCVORTTENIGMO

HORIZONTALE: 1 la plej komuna vorteto - fame konata estas ĵus glori-ta. 2 ekkrio - el haŭto - karesi per la lango. 3 solena malbeno - kiel la muzoj. 4 ĝi gapvagas sur la bankizo (rad) - helpas por espri mi la aganton - prilabori malmolan materion. 5 li posedas surnaturan povon - nedifinita - alia nedifinita. 6 bordero de tuko (rad) - ĝi kvakas - sen prokrasti. 7 por naski idojn - stiriloj. 8 japana pruno - la masklo portas disbranĉigitajn kornojn. 9 io ajn perceptebla, skribe aŭ geste - ekkrio - al mi. 10 dividas numeralojn - oni honoras ĝin per ia kulto - tiu litero estas uzita kiel mallongigo en mezursistemo.

VERTIKALE: 1 edzino de Jakobo - en ĝi kuniĝas la radioj. 2 ĝi insistas pri la sendifineco. - skandinavia monero - oni elfosas el ĝi metalon kaj mineralon (rad). 3 aparta branĉo - la plej brila stelo el la Liro. 4 en la antikva Italio - pronomo. 5 senrada veturilo - ĝiaj ĉevalharoj produktas muzikon. 6 skulptita gemo - malklara. 7 Tio, kio servas por efektivigi ion - ili interligas plurajn fadenojn. 8 malfaciligi - la aŭtobuso anstataŭis ĝin. 9 fariĝi - spice odora herbo (rad) 10 por montri - nedifina pronomo - atoma parto.

NOTO: La literoj, kiuj okupas la signalitajn ĉelojn, elformas apostrofon trandonantan al vi la plej bonan deziron de la verkintino.

## KONKURSO

La unua solvint(in)o de tiu krucvorttenigmo ricevos premion sub formo de libro: "Tra dezerto kaj praarbaro" de Sienkiewicz.

Oni simple sendu la korektan solvon al la redakto de LA INFORMILO, 5 chemin de Blamecourt, 55000 BAR-le-DUC.

## SILABENIGMO

Per la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj" vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La la kaj 4a kolonoj eldonas proverbon, se vi ilin legos vertikale.

al ano ap ar ar avo bo bu dio e eb ejo es ino io ka ke kle ko kso li lmo lu mo mu nh no ob  
ok oni pe pla pr re ri so so so sa ti tit to to tu va za zo

1	+ - - + - - -	sukeraĵo
2	+ - - + - -	pli granda ol orta
3	+ - - + -	bongusta fiŝo
4	+ - - + - -	elemento, atomnumero 22
5	+ - - + -	sekrecio de abelo
6	+ - - + -	ĉiam ĝoja dum niaj staĝoj
7	+ - - + - -	sendukta glando
8	+ - - + - - -	vulkanizita kaŭĉuko
9	+ - - + - -	diskonateco de homo
10	+ - - + - -	remaĉulo de Kongolando
11	+ - - + - - -	peri pri kontraktfarado
12	+ - - + - - - -	malnova formo de fusilo
13	+ - - + -	kie oni luas
14	+ - - + - - -	sumo kredita ĉe ies konto
15	+ - - + - -	ni difine ne perdas ĝin
16	+ - - + - - -	ŝmiraĵo por virinoj
17	+ - - + - - -	antikva montara regiono